

BELGA ESPERANTISTO



MONATA REVUO



Oficiala organo de la Belga Ligo Esperantista

redaktata de VAN DER BIEST-ANDELHOF, direktoro ;

LÉON CHAMPY, FRANS SCHOofs kaj

OSCAR VAN SCHOOR.

ABONPREZO :

Belglando . . . Fr. 4.— (Sm. 1.60)

Eksterlando . . . Fr. 5.— (Sm. 2.—)

Unu numero . . . Fr. 0.40 (Sm. 0.16)

Tarifo de la reklamoj (Prezo en frankoj)

	1	1/2	1/4	1/8	1/16
	paĝo	paĝo	paĝo	paĝo	paĝo

1 jaro

(12 n.) 90.— 50.— 30.— 18.— 10.—

1/2 jaro 50.— 30.— 18.— 10.— 6.—

1/3 jaro 40.— 24.— 13.— 8.— 5.—

1/4 jaro 30.— 18.— 10.— 6.— 4.—

1 numero 15.— 10.— 6.— 4.— 2.—

Redakcio. Adreso por tio, kio koncernas la redakcion (artikoloj, ĉiuj specaj informoj, ĵurnaloj, broŝuroj, libroj) : S-ro VAN DER BIEST-ANDELHOF, 20, Arendstraat, Antwerpen (Rue de l'Aigle, Anvers).

Administracio. (Abonoj, mensejoj, k. t. p.) S-ro FR. SCHOofs, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen (Rue de la Petite Ourse, Anvers).

Anonco pri korespondado :

kun la numero de la ĵurnalo, en kiu ĝi estas presita : Fr. 0.50.

Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendadas. — La Redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.

BELGA LIGO ESPERANTISTA

Antverpeno, la 8-V-1911.

Estimata Samidean (in)o,

Ni havas la honoron inviti vin por partopreni en **3a belga esperantista kongreso**, kiu okazos en Charleroi, je dimanĉo la 4a kaj lundo la 5a de junio (Pentekostaj festotagoj).

Kiel kutime, la kongreso konsistos el la regula ĉiujara kunsido de la Belga Ligo Esperantista kaj el allogaj festoj, organizotaj de la Karloreĝa grupo.

La Karloreĝa urbestro oficiale akceptos la gekongresanojn ; la kongresa kunsido estos tre interesa kaj la restado en Charleroi tre agrabla.

Ne nur la tiea ekspozicio estos granda allogo, sed ankaŭ tre ŝatinda estos la ekskurso en la ĉerman regionon de Thuin, farota la morgaŭan tagon.

Ni esperas, Estimata Samidean (in)o, ke vi bonvolos respondi al nia alvoko, kaj aligi kiel eble plej baldaŭ.

Diversaj fremdlandaj esperantistoj ĉeestos la kongreson, kiu konsekvence estos reala festo de internacia interfratiĝo.

Ni prezentas al vi, Estimata Samidean (in)o, mian plej afablan saluton.

La ĝenerala Sekretario,

Léon Champy.

La Prezidanto,

Van der Biest-Andelhof.

PROGRAMO

DE LA

III^a BELGA ESPERANTISTA KONGRESO

(Charleroi, la 4-5an de junio 1911)

UNUA TAGO, DIMANĈO

- 9 h. 1/2. — Kunveno de la gekongresanoj en la sidejo de la Karlora grupo *Café du Luxembourg*, apud la reĝa Ateneo.
- 10 h. — Oficiala akcepto en la Urbdomo.
- 11 h. — Jara ĝenerala kunsido de la *Belga Ligo Esperantista* (en kunveno poste difinota).
- 1 h. — Laŭvola tagmanĝo kaj vizito al la haloj de la Ekspozicio.
- 5 h. 1/2. — Festmanĝo en la granda salono de la Borso (Passage de la Bourse).
Vespere. — Promenado en la ĝardenoj kaj inter la allogaĵoj de la Ekspozicio.

DUA TAGO, LUNDO

A. — Por la gekongresanoj kiuj deziras detale viziti la Ekspozicion :

- 9 h. 1/2. — Kunveno en la sidejo de la Karlora Grupo, *Café du Luxembourg*.

B. — Por la personoj kiuj deziras partopreni en la kampara ekskurso :

- 9 1/4 h. — Kunveno en la Suda stacidomo.
- 9.36 h. — El Charleroi al Lobbes (10 h. 7.) ; vizitado al la antikva preĝejo de S-ta Ursmer kaj ĝia kriptoj.
Piedira promenado ĝis Thuin.
- 11 h. 1/2. — Vizitado al la pentrinda kaj malnova urbeto Thuin.
- 12 h. — Tagmeza manĝo en Thuin.
- 1 h. 1/2. — Agrabla promenado al « Hermitage » kaj « Calvaire », tra arbaroj.
Vespere. — Reveturo al Charleroi vagonare.

Belga Ligo Esperantista

TAGORDO

de la ĝenerala kunsido, okazonta en Charleroi, dimanĉon, la 4an de junio 1911, je la 11a matene, tre akurate.

1. — Parolado de la prezidanto.
2. — Raporto de la ĝenerala sekretario pri la agadoj de la Ligo dum 1910-1911.

3. — Raporto de la kasisto. Bilanco.
4. — Disdono de la diplomoj pri profesora kapableco.
5. — Propono pri ŝango de la regularo. Art 14. Anstataŭ : *La liga jaro komenciĝas la 15an de novembro, difini la 15an de majo.* (S-ro Van der Biest-Andelhof).
6. — *Esperantistoj, portu ĉiam la Verdajn Stelen!* Parolado de S-ro F. Mathieux (Bruselo).
7. — Elekto de ses membroj el la komitato, laŭ art. 7a de la regularo. La eliritaj komitatoj estas S-roj L. Champy (Antverpeno), D-ro Dupont (Beyne-Heusay), Komandanto Duverdyn (Brugo), Pastro Richardson (Bruselo), Fr. Swagers kaj Osc. Van Schoor (Antverpeno). Ĉiuj estas reelekteblaj.
8. — Difino de urbo de la 4a kongreso.
9. — Eventualaj komunikaĵoj.

GRAVAJ SCIIGOJ

- La kongreskarto kostas 1 frankon.
- La kotizajo por la festeno (sen trinkaĵoj) estas fr. 3.50.
- La fervoja vojaĝo - Charleroi - Lobbes kostas : 3^e kl. 1.00 fr. 2^e kl. 1.75 fr. ire kaj revene.
- La organiza komitato faros la necesajn klopodojn por ke la kongresanoj eniru senpage la Ekspozicion.
- Ĝi interkonsentis kun la komitato pri loĝejoj (Comité des Logements) laŭ la jenaj kondiĉoj :
— La kongresanoj kiuj enskribiĝos sufiĉe frue povos rezervigi komfortajn kaj purajn ĉambrojn (kun matenmanĝo) po 3, 4, 6, 8 aŭ 10 frankojn por unu persono ; rekomendataj estas la ĉambroj de 4 frankoj.
- La prezidanto de la organiza komitato, S-ro Delvaux, Boulevard Joseph II, 10, Charleroi, sendos al ĉiu mendanto provizoran biletan rajtigantan la deziritan ĉambrojn (Oni bonvolu sciigi lin pri la prezo kiun oni deziras elspezi). Alvenante en Charleroi la posedanto de tiu bileto turnu sin al la tramvoja atenddomo sur la Placo de la Suda Stacidomo, kaj tie li ricevos, interŝange, sian loĝbileton, pagante, kiel aldonajon por la elspezoj de la « komitato de Loĝejoj » 10% de la ĉambra prezo. La prezoj de la ĉambroj estas difinitaj por unu persono, sed se, interkonsente kun la mastro, du personoj loĝas en la sama ĉambro, la prezo estos pligrandigata je 50%.

— **Notinde** : Se la loĝbileto ne estos postulata antaŭ dimanĉo tagmeze, ĝi ne plus estos uzebla.

— La organiza komitato insiste petas la partoprenontojn, ke ili bonvolu sendi sian aliĝon kun la prezo de la kongreskarto kaj de la festmanĝo al la Prezidanto S-ro L. Delvaux, 10 Boulevard Joseph II, Charleroi, kiel eble plej baldaŭ — plej malfrue la 28an de majo ; se ne la bona organizacio de la kongreso ne povas esti garantiata. Pro la sama kaŭzo ne estos eble akcepti en la festena salono la neenskribiĝintajn kongresanojn. Oni estas petata, enskribante sin, diri kiom da punktoj oni pasigos en Charleroi, se oni deziras, lundon, viziti la ekspozicion aŭ partopreni en la ekskurso, kaj anongi la horon kaj tagon de la alveno. Karloraĝaj grupanoj atendos siajn samideanojn sabaton kaj dimanĉon ĉe la stacidomoj (Suda kaj Okcidenta).

— Lastajn sciigojn oni ricevos poŝte kun la kongreskarto kaj, se necese, sabaton vespere kaj dimanĉon matene, turnante sin al la sidejo de la Karlora grupo *Café du Luxembourg* (apud la Reĝa Ateneo).

Trinkemula kanto

Laŭ la germana teksto de MÜLLER

(Der Rheinweinzecher) esperantigis ARNOLD BEHRENDT

Muziko laŭ FISCHER, aranĝis AD. PASTOR.

Solene

1. En kel' pro-fund a sid-as mi sur
 plen-a vin-ba-rel-o; en bon-hu-mor' so-
pli vigle
 pir-as mi al mi-a ĉarm-a cel-o Ser-
firme kun akcento
 vem-e kur-as jen la knab' aŭ ebl-e eĉ knab-
laŭ takto
 in-o, de l' sort-o est-as mi-a rab' la
 1. malakcele 2. malrapide
tre solene, majeste
 vin - o!

2.

3.

Demono ja surmentas min :
 soifo-nomo ĝia !
 Por ke mi do forpelu ĝin,
 jen helpas glaso mia.
 Kaj ĉiun nomas mi nun frat'
 aŭ eble eĉ fratino ;
 ekkaptas min amema stat'
 per helpo de rejnvino !

Sed ju pli multe trinkas mi,
 des pli mi soifigas.
 Pri tia trinkemulpasi'
 mi vere kontentigas.
 Kaj fine min konsolas mi
 aŭ eble eĉ knabino :
 de l' mondo la plej bona — ŝi
 kaj glaso kun rejnvino !

Apertaj ekzempleroj estas aĉeteblaj en la « **Centra Esperantista Belga Oficejo** » 20, Vondelstraat, Antwerpen, (rue Vondel, Anvers).

Prezo : 10 centimoj.

7a Internacia Kongreso de Esperanto

20-27 Aŭgusto 1911

La loka organiza komitato ageme sin okupas pri la kunmetado de honora komitato. S-roj Leutenant-Generalo Van Sprang, komandanto de la militista distrikto ; Grafo de Baillet-Latour, provincestro ; De Vos, urbestro ; General-Majoro Willaert, komandanto de la burĝa gardio, kaj D-ro Desguin, skabeno de la Publika Instruado, akceptis honorajn prezidantecojn de la kongreso.

— La Urbeŝtaro donis novajn pruvojn de sia intereso al la Sepa, permesante al la gekongresanoj la senpagan eniron, dum la tuta daŭro de la kongreso, en la muzeojn kaj en la salonojn de la urbeŝtaro, kaj pruntedonante aron da belaj kliŝoj al la Sepa por ĝia kongreslibro.

— La kongresanoj estas insiste petataj, ke ili senprokraste rezervigu siajn ĉambrojn (pri la prezoj, oni legu la aligilojn). Mendoj ne akompanataj de la mono, aŭ ne sciigantaj pri la tago de laveno, ne estos plenumataj.

— Jen estas nova serio de favorantoj de la literaturaj konkursoj :

11. **La Revuo**, internacia gazeto, Hachette & K-io, 79, Boulev. St Germain, Paris. — *Originala studo pri historio, literaturo aŭ arto*. Maksimume 25 presitaj paĝoj de la « Revuo » ; 1a premio : fr. 100 = Sm. 40 ; 2a premio : 50 fr. = Sm. 20.

12. **Fervoro**, esperantista grupo, Antwerpen. — *Kvarversajo*, temo laŭvola. Premio : fr. 50 = Sm. 20.

13. **Ĉekbanko Esperantista**, Merton Abbey, London S. W.. — *La plej taŭga, konciza klarigo de la esencoj de ĉekoj kaj transpagiloj kaj iliaj taskoj kaj utilo en komerca pagado*, facile komprenebla al tute nesperta kontulo, tiamaniere ke li sen plua instruo nepre ekvidas iliajn utilojn kaj praktike ilin povas uzi. Premio : konto malfermita ĉe la « Ĉekbanko », kun kredita saldo de fr. 62.50 = Sm. 25.

14. **Juneco**, revuo esperantista de la junularo, Paris. — *Rakonto, novelo, versaĵo* pri iu ajn temo verkita de persono, malpli ol 20 jara. Premio : bela arta objekto.

15. **F-ino Maria Moreau**, Bruxelles. — *Rolo de la virinoj en la esperantista movado, plej taŭgaj rimedoj por enkonduki Esperanton en la internaciajn virinajn instituciojn*. Premio : fr. 30 = Sm. 12.

16. **La Movado**, monata Esperanto-Gazeto, 31, boulevard St Marcel, Paris. — *Humora rakonto, en kiu Esperanto ludas volon*. Maksimume : unu presita paĝo de « La Movado ». Du premioj : artaj objektoj.

17. **Miss J. E. Hamand. Schaller**, Iowa (Usono). — *Utilo kaj praktikaj profitoj de Esperanto por aviadistoj*. Premio : 100 fr. = Sm. 40.

— La speciala komitato, kiu sin okupas pri la postkongreza vojaĝo, aprobis la sekvantan provizoran planon :

Lundon, 28an de aŭgusto. — Vizito al Charleroi, nokteloĝado en Namur. *Mardon, 29an*. — Ekskurso al la grotoj de Han kaj al Dinant ; nokteloĝado en Lieĝo.

Merkredon, la 30an. Vizito al Spa, promenado en Lieĝo. Komuna vespermanĝo kaj koncerteto en Lieĝo.

Ĵaŭdon la 31an. — Vizito al Ostendo kaj Brugio.

Vendredon, la 1an de septembro. — Vizito al Gento.

Sabaton, la 2an. — Vizito al Bruselo ; de tie ferrotejo al Temsche kaj vaporŝipe al Antverpeno.

**Nomaro de la kongresanoj aliĝintaj antaŭ
la 4a de majo 1911**

591. S-ino Gen, Villa Mezzo Monte, boulevard Mont-Boron,
Nice (Alpes-Mar.-Franc.)
592. David, Joseph, farmaciisto, Couterne (Orne-Franc.)
593. S-ino David, » » » »
594. Simon, Georges, komercisto, 28, rue des Chapeliers,
Montereau (Seine-et-Marne, Franc.)
595. Hayes, Charles Frederic, librotenisto, Swanage Road, 48,
Wandsworth, London (Angl.)
596. S-ino Allery, 52, boulevard Arago, Paris (Franc.)
597. F-ino Allery, » » » » » »
598. Verbanck, Frans, instruisto, 25, rue André Hennebicq, Bruxelles, (Belg.)
599. F-ino Emmerson, H. M. Prison, Staff, Leeds (Yorkshire-Angl.)
600. Mathieson, J. West View House, Blackhill (Durham) »
601. S-ino Mathieson, » » » » » »
602. Strong, Frederic James, 19, Chester Street, Coventry (Warwicksh.- »
603. Gill, J. Arthur, Lower Green Road, Rasthall, Tunbridge-Wells- »
604. Zajcev, Aleksandr, lingvisto, Pet. St. Mitninskij, per. D5, loĝ. 55,
Peterburg (Rus.)
605. D-ro Palleja, Roman, kuracisto, Ulldemolins-Tarragona (Hispan.)
606. S-ino Palleja, » » » » » »
607. Societo « *Espero Kataluna* », Tallers, 81, Barcelona (Katal.-Hispan.)
608. S-ino Graveren, Marie, Egholmwej, Skanderborg (Danujo)
609. Mèda, Gaston, kasisto, Crédit Lyonnais, Toulouse (Franc.)
610. Reed, Edwin C., 816, 15 th street, N. W., Washington D. C. (Usono)
611. S-ino D-ro Kellerman-Reed, Ivy, » » » » » »
612. de Allende, Victor O., inĝeniero, Diputación, Bilbao (Vizcaya-Hispan.)
613. S-ro Arnold, F. R., Horn (Thurgau, Svis.)
614. F-ino Butler, Cora L., muzikinstruistino, 2074, Richmond Terrace,
Port Richmond (New York-Usono)
615. Leprieur, Auguste, rentulo, 82, Boul. St Germain, Paris (Franc.)
616. Couraye, René, bienulo, Grande rue, Dozulé (Calvados- »
617. Adams, Alfred John, puntfabrikisto, Plynlmmon Terrace, Hastings (Angl.)
618. Merrick, W. Percy (blindulo), Elvetham, Shepperton (Anglujo)
619. S-ino Wright, Selina E., 11, Oxford Terrace, Gateshead »
620. Green, Edward C., studento, Oxley House, Studley Terrace,
Newcastle-on-Tyne »
621. Berger, Alfred, komercisto, 22, Mauerweg, Frankfurt a/M (Germ.)
622. F-ino Hodgson, C., 52, Lower Sloane Street, S.W., London (Angl.)
623. F-ino Tiedeken, Käthe, 17, Sallstrasse, Hannover (Germ.)
624. D-ro Llinas, Antonio, Monseny, 67, 2, 2, Barcelona (Hispan.)
625. Neal, G., 6, Graham Road, Pendleton, Lanes (Angl.)
626. F-ino Neal, » » » » » »
627. Fillet, Jan, oficisto, 58, Vredestraat, Berchem-Antwerpen (Belg.)
628. Finebloom, Hyman R., oficisto, 8, Wipstr., » » » » » »
629. Hermans, Julien, policoficiero, 46, Waterloostraat, » » » » » »
630. Wilcke, Otto, litografisto, 44, Delinstraat, » » » » » »
631. Wichert, Ernest, arkitekto, 25, Leibnizstr., Charlottenburg (Germ.)
632. F-ino David, Florentine, Couterne (Oise Franc.)
633. Whitcomb, J. 32 E. 23d Street, New-York (Usono)
634. Silbernik, Josefo, 240 E., 19th Street, » » » » » »
635. Vonaho, Rajnoldo, pacjuĝisto, stacio Handaohedza, Mangurujo (Ĥinujo)
636. Hirst, W. H., Esperanto house, 46, Thornton Lodge Road,
Huddersfield (Yorksh.-Angl.)
637. F-ino Arter, Annie, «The Homestead», Wash Lane,
Timperley (Chesh. - »

638. F-ino Magee, Millicent, 31, Howard Street, Salford, Manchester (Angl.)
639. Doran, Edmund Thomas, 52, High Bank, Gorton, » » » »
640. Lord, John S., 60, Charles Street, Moorside nr Swinton, » » » »
641. Horrocks, Louisa, 283, Stretford Road, » » » »
642. F-ino Anglada, Agna Maria, 21, Hospital, Barcelona (Katal.-Hispan.)
643. Anglada, Baldomero, komercisto, » » » » » »
644. Urbez, Carlos, arta desegnisto, 156, Rosellon, » » » » » »
645. Sutcliffe, Arthur, oficisto, 5, Cliffe Street,
Padiham nr Burnley (Lancash.-Angl.)
646. Geier, Otto, teknikisto de teksado, 243, C.G. Hoffmannstrasse,
Neugersdorf (Saks.-Germ.)
647. F-ino Carew, Lola, 103a, Fulham Road, S. W., London (Angl.)
648. F-ino Roche, Dusa » » » » » »
649. Vega, E. A., komerca vojaĝisto, 7, Stierstraat, Antwerpen (Belg.)
650. Stoffels, Constant, advokato, 6, Eikenstraat, » » » » » »
651. Stalker, Peter, maringeniero, 7, Morton Street, Leith (Skotl.)
652. F-ino Allan, Janet, 37, James Street, Pilrig, Edinburgh »
653. Keddie, Frank W., urba oficisto, City Chambers, » » » » » »
654. Rae, William, 28, Angle Park Terrace, » » » » » »
655. Smith, Archibald H., 100, Macdonald Road, » » » » » »
656. F-ino Wanless, Beatrice, 3, Valleysfield Street, » » » » » »
657. F-ino Wanless, Belle, » » » » » »
658. Stauss, Richard, komercisto, 22, Calwerstrasse, Stuttgart (Germ.)
659. Vermandel, Arthur profesoro, 72, Borgerhoutschestr. Antwerpen (Belg.)
660. F-ino Miers, Jane, 40, Osystraat, » » » » » »
661. F-ino De Jaegher, Paula, 85, De Bomstraat, » » » » » »
662. F-ino Peeters, Josepha, Lamorinièrestreet, » » » » » »
663. F-ino Verbeeck, Jeanne, direktorino de la Profesia Lernejo,
21, Bouwmeesterstraat, Antwerpen (Belg.)
664. F-ino Van de Weygaert, Joséphine, 7, Appelmansstraat, » » » » » »
665. Daniel, Emile, ĉefprezidanto de la Apelacia Kortumo,
103, rue Crevier, Rouen (Franc.)
666. S-ino Daniel, » » » » » »
667. Biskup, Karel B., urba konsilanto, Skuherského, 737-VII,
Praha (Bohem.-Aŭstr.)
668. S-ino Biskup, » » » » » »
669. F-ino Bickell, Catharine S., Winteringham via Doncaster (Lincolnsh.-Angl.)
670. F-ino Gibb, Gertrude M., High School, Wakfield »
671. Pollard, John Taylor, bankoficisto, 18, Kents Bank Road, Buxton (Derb.) »
672. Firth, Albert, 41, Buckrose Street, Fartown, Huddersfield (Yorksh.) »
673. Alker, J. W., inĝeniero, 83, Peasley Cross Lane, St. Helens (Lancash.) »
674. Iddon, George, 38, London Street, Southport » »
675. Chadwick, Jonathan, butikisto, 8, Drake Street, Rochdale » »
676. Butterworth, Albert, komizo, 19, Midhurst Street, » » » » » »
677. Woolfenden, Thomas, butikisto, 24, Theetham Street, » » » » » »
678. Crawley, George Osborn, mekanikisto, Boden Street, 53, Nottingham »
679. Meakin, Claude, oficisto, Wimbourne Road, 55, » » » » » »
680. F-ino Van Pelt, Alice, Ossenmarkt, 23, Antwerpen (Belg.)
681. F-ino Van Pelt, Jeanne, » » » » » »

KARLOREGO

(CHARLEROI)

La ekspozicio — La postkongresa ekskurso

Admireginda blanka kolonado, kronita per monumentaj emblemoj, kiuj prezentas diversnaciajn laborfakojn, jam super-rigardas la regionon. Aro da febre martelumantaj laboristo, senhalte altigas gigantajn ĉarpentarojn. De nun multnombraj

haloj atendas sian **tehnikan meblaron**, tien alkondukotan el ĉiuj belgaj laborejoj. Ne nur sciencajn kaj industriajn produktadojn ni povos baldaŭ prezenti al la mirantaj okuloj de la fremduloj, sed eĉ la malplej kontentigeblaj plezuramuloj pasigos feliĉajn horojn. Ĉarmaj festoj, strangaj ludoj, sensaciaj konkursoj ĉi-momente ĝojigos la vizitantaron. Ĉefe interesaj estos la konstruaĵoj de « Luna Gardens », kiuj eble superos ĉiujn tiaspacajn ĝis nun viditajn amuzadojn. Unuvorte, nia ekspozicio, rilate al siaj specialaj fakoj, estos certe la plej granda elmonstro, kiu estos okazinta en nia patrujo.

La organiza komitato de la 3a belga esperantista kongreso aranĝos je la Pentekosta lundo ĝojplenan kampanon ekskurson sur la bordoj de la Sambro, ne tra vilaĝoj nigritaj per terkarba polvo, sed en la alridetanta valo, laŭlonge de la pentrinda montaro kiu etendiĝas ĝis Thuin.

Malproksime de Landelies, meze de vasta amfiteatro, staras la disfalantaj muroj de la malnova abatejo de Aulnes, detruita antaŭ unu centjaro de la francaj revoluciuloj. Je okazo ni ne forgesu ĝui la imponantan impreson de tiu fama loko, la impreson kiu lasas, eĉ ĉiu naturamanta homo, la elvokon de glora estinteco kaj samtempe tiel majeste per ŝtonegoj kaj arbaroj ornamita scenejo.

Rapida vagonaro kondukos nin ĝis la malgranda urbo Thuin. Kiel giganto, la kvadrata belfrido superregas la ĉirkaŭetendiĝantajn valojn de la Sambro kaj de la bruanta rivereto Biesmes, ĉiuflanke plibeligitajn per kamparaj dometoj kaj florriĉaj ĝardenetoj. Al tiuj, kiuj bezonas kvietecon kaj serĉas ripozon, ni varme rekomendas la freŝan ombron de la arbaroj kaj la resanigan aeron de la montoj, kiuj ĉirkaŭas Thuin.

Mia celo estis montri ke Karloredo estas vere riĉa je diverspecaj allogaĵoj.

La vidvolaj vojaĝantoj instruiĝos per neordinaraj vidindaĵoj, kaj samtempe mallaciĝos per multnombraj distraĵoj.

Utile dulci !

FELIX WAGNER.

DE BRUSELO AL KAIRO

(BLINDULKONGRESO)

II. Milano - Jaffa

Jaŭdon, la 9an de februaro 1911.

Mi forveturis el Milano je la 15a horo kaj alvenis en Brindizio la sekvantan tagon je la 13a horo, anstataŭ ol je la 11a, kiel diras la Itala horlibro. Dum tiu 22hora vagonarveturado mi

havis la tre maloftan ŝancon vidi la Italujan Kruron tute per neĝo kovritan.

En Brindizio mi plezure kuniĝis kun dek belgaj kongresanoj, inter kiuj : S-ro ministro van den Heuvel, la honorinda Patro Amedeo, ĝenerala superulo de l' Fratoj de la Bonfarado, S-ro senatano Raepsaet, el Oudenaarde, la tri oficialaj delegitoj de nia Registaro.

Je la 15a horo ni enŝipiĝis sur maro plej bela, kaj, ĉar estis mia unua marveturado, miaj kamaradoj avertis min, ke mi tute ne devas timi pri ŝippereo, eĉ ne pri marmalsano. La morgaŭan matenon ni jam estis trapasintaj la Otrantan markolon, kaj dum la tuta tago ni pasigis la tempon rigardante la insulojn kaj la bordmontarojn de Grekujo. Vespere, en malproksimo, sin montris la montoj de Kandio, kies lastajn ni vidis ankoraŭ dimanĉon matene. Post tio, nenio plu sin prezentis al niaj rigardoj, krom la blua sennuba ĉielo kaj la verdnigra akvo.

La unuaj tagradioj de la lunda mateno montris al ni Aleksandriion kun ĝia bela haveno, kaj ni forlasis je la 8a horo nian flosintan loĝejon.

Metinte la piedon sur la Egiptan teron, ni faris baldaŭ malagrablan konstaton : multege da laboristoj, ĉu en la haveno, ĉu en la urbo, estas unuokulaj. Tiu konstato devigis min supozi ke grandega ankaŭ estas tie la nombro da blinduloj ; efektive, dum la kongresaj tagoj oni sciigis nin, ke, laŭ statistiko verŝajna, estas en Egiptujo pli ol 150.000 blinduloj, ankaŭ tiom da duonblinduloj, kaj ke 90 p. c. personoj suferas pro okulmalsano.

Jam en Aleksandrio mi lernis mian unuan araban vorton : « *bakcis* », kiu signifas samtempe *almozo* kaj *trinkmono*. Tiun vorton mi ne povos forgesi, ĉar dum mia restado en tiuj orientaj landoj mi ĝin aŭdis pli ol milfoje, senvole kaj eĉ kontraŭvole.

Post esploro de niaj pakajoj en la limimpostejo, ni traveturis parton de la urbo par iri al la stacidomo. Tiu mallonga vizito ne ebligas min priskribi la urbon ; ĝi ŝajnas bela, laborplena kaj havas aspekton de sud-eŭropaj haven-urboj.

La vagonaro nin rapide forportis, tra la multproduktaj kampoj de l' Delto ĝis Abu-Hammad ; de tie, tra la sabla dezerto, ĝis Port-Said. De Ismailia ĝis Port-Said, sur longo 77 kilometra, ni flankveturis la faman Suez-kanalon, kaj de Kantarah ni ankaŭ sekvis la grandan lagon Menzaleh.

La Delto kaj la Nilbordo estas la nura parto de Egiptujo, kie homoj povas loĝi, kaj ĝi estas tre popolhava : sur amplekso, kiu ne multe superas Belgujon, ĝi enhavas dekmilionopan loĝantaron. Ni preterpasis multe da urboj, kun Eŭropa aspekto ; ankaŭ multege da vilaĝoj kun teraj mizermontraj dometoj. Ni vidis ĉie la kampanon plenan de homoj ĉu laborantaj ĉu promenantaj, kredeble ĉar ilia loĝejo ne estas komforta, por

pasigi la tagon en ĝi. Se mi povas kredi la tieajn dirojn, en tiuj domaĉoj la homoj dormas sur pajla tapiŝo, kaj la sama ĉambro estas la refugejo de la azenoj, bovinoj, kaprinoj, k. c.

Ne ĉarojn oni vidas en la kamparo, ĉar tie estas ne stratoj; nur mallargaj vojoj, sur kiuj marŝas multepeze ŝarĝitaj multe da kameloj kaj multege da azenoj; ankaŭ la homoj estas bonaj portistoj. La plugilo estas tirata de bovoj, de bufaloj, malofte de ĉevaloj.

Interesplenaj estas la laboroj por akvumadi la kampojn de l'Delto; ĝenerale la terkulturado tie estas tre lerte farata.

En la urboj oni trovas tramvojojn kiel en Eŭropo, ankaŭ fiakrojn; la viroj rajdas sur ĉevaloj, sur kameloj, kaj precipe sur azenoj. La araba ĉevalraĵo, jam de longe fama, estas efektive grandioza; sed la azenraĵo estas pliofta, kaj tro ĉarma; la kamelraĵo male, certe tre utila, estas tute ne bela.

Ofte dum nia restado en Egipt- kaj Palestinlando ni vidis scenojn naŭzigajn: kiam ĉevaloj, kameloj, pliofte azenoj (ĉar ili estas pli multnombraj) falas mortantaj en la stratoj, la mastro ilin maljungas kaj daŭrigas sian vojon. Tuj akuras hundaro kaj komencas la manĝadon; dum la nokto la ŝakaloj finas la festenon, kaj la morgaŭan matenon oni ankoraŭ trovas nur kelke da tro malmolaj ostoj, sola restaĵo de la fidela besto, kiu, ĝis sia lasta spiro, nur vivadis por servi al mastro ofte kruela, sendanka, tute forgesema pri la ricevitaj servoj. Strange!

Kiam ni trarajdis la dezerton, blovis sufiĉe granda vento: la sableroj flugis supren, amasiĝis tie en grizaj nuboj, kaj refalis teren, ĉu sablopluve, ĉu amase. Eĉ en nia vagonfako niaj vestoj griziĝis kaj suferis niaj okuloj pro tiu stranga pluvado. Tiam personoj zorgemaj surmetas nigrajn okulvitrojn, ĉar tiu sablodisflugo kaj la helega sunbrilo estas kaŭzoj de blindigo. Bedaŭrinde estas en tiu lando multe da homoj senzorgemaj laŭ higiena vidpunkto.

Kun granda intereso ni rigardadis la Suez-kanalon, tiun grandiozan, utilegan, sed multegkoston produktajon de l' homa aktiveco. Se mia memoro estas fidela, ĉiu ajn ŝipo pagas traŝipimposton po 9 frankoj la tonelon. Oni diris al ni en Port-Said, ke angla ŝipo, kiun ni estis renkontintaj, pagis tiun matenon mem 21,700 fr., kaj ke de la 1a ĝis la 10a de februaro, la ŝiptrapasado produktis 1,370,000 fr. Malgraŭ tio, la kanalo faras al la marveturado ŝatindan servon kaj profiton, ĉar oni ne devas forgesi, ke ĝi ŝparas al la Eŭropa pororienta ŝiparo la ĉirkaŭiron de la tuta afrika kontinento. Ni do prave, kun ĉiuj trapasantoj, aklamis en la Portsaida haveno la grandegan statuon de de Lesseps, kiu staras tie por esprimi al la venontaj generacioj la dankon de la homaro al tiu glora geniulo.

Tuj post nia alveno en Port-Said, ni enŝipiĝis por Jaffa, kaj ĉeestis dum multaj horoj la ŝarĝadon de l' ŝipo. Tiu iom

longa atendado ebligis nin observi la agemecon en la haveno kaj la gajan karakteron de la multopaj laboristoj.

Post vespermanĝo kaj sufiĉe longa interparolado pri nia traegiptuja vojaĝo, ni enlitiĝis, kaj mi, dolĉe lulata de la bona maro, baldaŭ ekdormis kun la ĝojiga penso, ke morgaŭ mi ĝuos la neniam revitan feliĉon komenci mian pilgrimadon en Tero Sankta.

FR. ISIDORO.

La Urbestro de Londono kaj Esperanto

Publika parolado farita de Sir Vezev Strong la 17an de marto en la « City of London School » sub la patronado de la Duko kaj Dukino de Connaught, okaze de kunveno por monsubteni la kason fonditan de la urbestro por starigi memorajon al la Reĝo Eduardo VIIa.

SINJORO PREZIDANTO, SINJORINOJ KAJ SINJOROJ,

Unue, permesu, ke mi diru, kiel mi ĝojas havi denove la okazon — kaj en ĉi tiu diro mi scias, ke mia edzino sentos kun mi — la okazon denove renkonti tiujn entuziasmajn homojn, kiujn oni nomas Esperantistoj. Ni ĝuis similan privilegion antaŭ kelkaj jaroj, kiam okazis kongreso de reprezentantoj de multaj nacioj en la Guild-Hall. Estis tiam mia privilegio, reprezenti la tiaman Urbestron akceptante tiujn reprezentantojn, kaj dum la vespero mi havis la okazon diri al ili kelkajn vortojn. En tiu vespero mi trovis, ke mi estas — se ne la sola anglo inter la ĉeestantoj — almenaŭ la sola, kiu ne komprenas Esperanton, kaj sen Esperanto mi ne povis komprenigi al la aŭskultantaro miajn tute ordinarajn rimarkojn. Mi ne jam antaŭe havis la tempon, lerni la dekelkon da lingvoj reprezentataj, kaj mi ne estis kapabla alparoli ĉiujn el ili samtempe en unu fojo per Esperanto. Mi do devis fidi al mia amiko, S-ro Mudie, kaj li donis al mi lian internacian bonfamon, kiu de tiu tempo ĝis nun neniam min forlasis. Juĝante laŭ la entuziasma akcepto, kiun oni faris al miaj rimarkoj, mi klarige supozis al S-ro Mudie, ke li ja iel profitis mian nescion de Esperanto por aldoni mem kelkajn proprajn vortojn, sed li certigis al mi, ke tute ne tiel estis.

Mi nun denove venas, ne ĉi tiun fojon kiel reprezentanto, sed kiel la ĉefa urba oficisto mem, por certigi al vi, ke, kiel ajn longa estas la tempo, kiu pasis de post tiu okazo, ĝi nur efikis profundigi la intereson, kiun mi sentas al via movado kaj por pligrandigi mian admiron al tiuj bonaj homoj, kiuj praktikas Esperanton kiel helplingvon flanke de ĉiuj aliaj lingvoj, kaj kiu povas en tiu rilato iam fariĝi ĝenerala interkomunikilo. Vi angloj, kiuj praktikas ĉi tiun arton, ŝajnas al mi, meritas grandan laŭdon, kaj vi hodiaŭ

montris vian komprenon de la principoj, sur kiuj via movado estas bazita, per tio, ke vi arangis ĉi tiun kunvenon kaj tiel aliĝis al la movado por starigi memorajon pri nia mortinta Reĝo Eduardo VII.

Tre decas tiu aliĝo, ĉar la trajto eminenta en la vivo de la Reĝo Eduardo estis antaŭ ĉio lia sindediĉo, kaj lia kapablo influi la universalan pacon de l'homaro, kaj estas ja ĉar mi opinias Esperanton tiel grava helpo al tiu celo, ke mi kredas, ke viaj Esperantistoj juste rajtas pretendi vin kunlaborantoj kun ĉiuj, kiuj sekvas la politikon iniciatitan de nia granda mortinta reĝo, la movadon al universala paco. Tial, mi kun tre kora plezuro akceptos de ĉi tiu kunsido ian monoferon por mia memorajakaso.

Kio estas plej kapabla naski la militon—tiun plej vanan kiel plej krueleĝan el ĉiuj homaj stultajoj? Certe, estas la malkompreniĝo. Kiel oni povas plej bone malhelpi la malkompreniĝon inter personoj aŭ inter la nacioj? Ĉu ne estante absolute certa, ke oni perfekte komprenas la intencojn unu de aliaj? Kaj kiel oni povas ilin kompreni sendangere, se oni ne komprenas reciproke la lingvon unu de alia, la pensojn unu de aliaj tiel ĝuste komprenas reciproke siajn intencojn?

Estas ĉe ĉi tiu punkto, ŝajnas al mi, ke via lingvo venas nin helpi, kaj faras plej utilajn servojn en la intereso de la universala paco. Se tiel estas, tiam via movado meritas ne nur vian propran entuziasmon (kiu estas neniam rifuzata!) sed indas esti subtenata de ĉiuj, kiuj deziras starigi la harmonion kaj reciprokan amikecon inter la nacioj.

Gratuloj

La 25an de aprilo edziĝis en BOOM nia fervora kumbatalanto S-ro ERNEST ROSCAM kun F-ino MARIA VERBRUGGEN.

Al la junaj geedzoj, ambaŭ membroj de la Boom' a grupo, ni prezentas niajn plej sincerajn dezirojn por longedaŭra kaj prospera kunvivado.

B. E.

NEKROLOGIO

HORACE HUET

Granda perdo estas por la esperantista movado la morto de S-ro HORACE HUET, honora vicprezidanto de la Pariza grupo, membro de la Lingva Komitato kaj kunredaktoro de «La Revuo».

S-ro Huet fariĝis esperantisto de naŭ jaroj; li ne nur distingis kiel fervora propagandisto, sed ĉefe kiel klera lingvisto.

Jam de la fino de 1908 li malsaniĝis, sed ŝajnante pli bonfarta post longa restado sur la kamparo, li plenfide faris projektojn pri

la Antverpena kongreso. Ve, la morto etendis sian manon al li, kaj nia simpatia kaj vigla samideano elblovis la lastan spiron en Nice, la 28an de februaro. La 6an de marto oni enterigis lin en Parizo, kie multe da amikoj akompanis la altvaloran kumbatalanton al lia lasta hejmo.

Li ripozu en paco!

PAUL BERTHELOT

Jen ankoraŭ eminenta samideano forfalĉita el niaj vicoj. Li mortis la 2an de novembro 1910 en malproksima regiono de Brazilujo (Conceiçad de Araguaya), apenau dudekokjara.

De la jaro 1900 S-ro Berthelot jam partoprenis en nia movado; en 1903 li publikigis kun S-roj Cart kaj Merckens la unuan vortaron francan-esperantan; en kunlaborado kun S-ro Prof. Lambert li verkis la «Komercaj Leteroj»; oni ŝuldas ankaŭ al li tre interesan studon pri Fonetiko, subskribitan per la pseŭdonimo «Marcelo Verema».

En 1905 li eldonis la gazeton «Esperanto», ĉefredaktitan de Prof. Lambert el Dijono.

Li pasigis siajn lastajn jarojn en Brazilujo; li penetris en sovaĝan, nekonatan parton de tiu vasta lando, el kie li, bedaŭrinde, ne revenis. Antaŭ ol forlasi Eŭropon li esperantigis la komedion «Fantasio» de Alfred de Musset; ĝi post nelonge aperos en la kolekto de «La Revuo».

ALFONS VERWIMP

pac-juĝisto, mortis en Arendonk (Kempenlando), la 29an de marto. La bedaŭrata mortinto, kvankam nur de kelka tempo aliĝinta nian movadon, tre interesiĝis je ĝi kaj ĝin fervore propagandis inter siaj multnombraj amikoj. Kelkajn tagojn antaŭ sia morto li ankoraŭ petis S-ron Leo Heidendal, sekretarion de la Arendonk'a grupeto, fari paroladon pri Esperanto en la tiea sekcio de la «Davidfonds».

S-ro Verwimp estis membro de la nov-fondita Belga Katolika Ligo Esperantista.

B. E. prezentas siajn plej sincerajn kondolencojn al la funebrantaj familianoj.

PROBLEMOJ⁽¹⁾

19. — Ĉeno de Metagramoj. — (Ŝanĝu unu ajn literon en ĉiu vorto).

Amuza okupo — barako — peco da tero — sukerplena legomo — ŝnureta pleksaĵo — ceremoniaro — osto — batilo — trinkaĵo — feksebla vegetaĵo — planedo — nuna okupo.

20. — **Kruco en Lozango.** — Konsonanto — de unu ekstrema ĝis alia — preparita —
 FIGURO : esprimas temon — farita per multvalora metalo — membro — vokalo — pronomo — pli ol sufiĉe — ludkarto — necesa sufikso — kiu estos — vokalo — movo — kolekto — pronomo — veni internen — ofte uzata sufikso — vokalo.

21. — **Enigma aŭ stranga rezultato.** — Sinjoroj A kaj B sidas en unu kaj sama veturilo. Kvankam ili samtempe ekiris, ĉiam duope veturis, samtempe haltis, A trairis kvin kilometrojn, dum B trairis nur du kilometrojn. Klarigu, mi petas, tiun ŝajne neeblan rezultaton. PLANTANO.

(1) Oni sendu la solvojn, antaŭ la 25a de junio, al S-ro FRANS SCHOOPS, sekretario de la Redakcio, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen. (45, rue de la Petite Ourse, Anvers). Prefere skribitajn sur poŝta karto.

En la lasta numero de la 3a jarkolekto estos publikigataj la nomoj de la solvintoj. Oni povas respondi pseŭdonime.

Belaj premioj estos aljuĝataj.

HUMORAĴOJ

EL LA RELIGIO INSTRUADO

I.

La Pastro. — Diru, Peĉjo, la 4an versajon de la « Patro nia ».

Peĉjo. — Panon ĉiutagan nian donu al ni hodiaŭ, kune kun tranĉo da ŝinko.

La Pastro. — ??? Kun tranĉo da ŝinko?

Peĉjo. — Jes, S-ro Pastro, jen malgranda plibonigo de mi.

II.

La Pastro estis rakontinta la historion de Danielo, jetita en fosajon, mezen de leonoj kaj lian fidon en la Dia protekto, kiu mirakle savis lin. Volante moraligi, li fine demandis al Johĉo :

— Kion vi estus farinta, amiketo mia, se vi estus estinta en la stato de Danielo?

— Mi ne scias, respondis la knabo. Sed mi opinias, S-ro pastro, ke mi estus ... inta en mian pantalonon pro teruro.

III.

Alifoje la Pastro parolis pri la vespera preĝo. Li tre detale pritraktis tiun temon kaj finigante li konkludis : Ĉiam, antaŭ ol ekdormi, rekomendu vian animon al Dio.

Por certigi pri la efiko de sia instruado, la Pastro faris multajn demandajn al Joĉjo, al Peĉjo, al Paŭlĉjo. Fine, sin turnante al Henrikĉjo :

— Kaj vi, mia karulo, kion vi faras ĉiam, antaŭ ol ekdormi ?

— Mi, S-ro Pastro ? Mi tiras zorge mian ĉemizon sub min.

DIVERSAJ INFORMOJ

Alvoko al kristanaj samideanoj. — Dum la 7 a internacia esperantista kongreso estos aranĝataj du kunvenoj por kristanaj esperantistoj. Unu el ili kunigos kristanajn junajn virojn kaj mulojn, la alia estos por ĉiuj kristanaj samideanoj. La preparoj por la unua jam bone progresis, tiel ke kunveno certe okazos en la kunvenejo de la K. U. J. V. (U. C. J. G.), Van Schoonbekerstraat, 111, Antwerpen, je la 20a de aŭgusto, posttagmeze. Pri la dua kunveno la kunvenejo ne estas ankoraŭ difinita.

La personoj, kiuj intencas partopreni en la supre cititaj kunvenoj, estas insiste petataj konigi, kiel eble plej baldaŭ, sian nomon al S-ro Paul Hübner, Hubertusstrasse, 45, Delbrück bei-Köln (Germanujo).

— **Internacia Higiena Ekspozicio en Dresden (Germanujo).** — Senpage ricevos ĉiu samideano, kiu sendas internacian respondkuponon al S-ro D-ro Schramm, Dresden, 20, (Germanujo) la *belegin Esperante presitan broŝuron pri la Internacia Higiena Ekspozicio en Dresden*. Ĝi enhavas multajn ilustraĵojn kaj bonajn artikolojn kaj estas bona propagandilo. Estas grava afero, ke aperis ne nur nacilingvaj broŝuroj pri la ekspozicio, sed ankaŭ Esperanta broŝuro. Ĉar ni volas montri al la Registaro, Urbeŝtraro kaj Estraro de la ekspozicio, kiel *granda* jam estas la Esperantistaro, ni petegas ĉiujn samideanojn sendi internacian respondkuponon. Tuj ili ricevos la valoran libron.

Esperantistoj, montru, ke vi ŝatas vian lingvon kaj postulu Esperante presitan broŝuron pri la *Internacia Higiena Ekspozicio en Dresden*.

— **UNIVERSO, internacia klubo de korespondantoj kaj kolektantoj.** Tiu ĉi unuigo havas membrojn jam en multaj landoj ; ĉiu korespondema kaj kolektema esperantisto devas aliĝi. La jara kotizo nur estas fr. 2 1/2 = 1 Sm. ; ĉiu ano ricevas senpage la monatan memrorliston kaj la belan klubgazeton « La Kolektanta Esperantisto ». Proxnumeron kaj aliĝilon sendos senkoste la prezidanto, S-ro G. Strössner, Bruffach 28, München.

— Deziras korespondi :

S-ro Jacinto Camella, 18, Plaza Mayor, Vich (Barcelona — España), per ilustritaj poŝtkartoj ;

F-inoj Anie kaj Vic, Lupsin, 15, Grand'Place, Bruxelles.

Wel Esperanto in den Vreemde

L'Esperanto à l'Étranger

BALKANLANDEN. — Onder de esperantische bladen onderscheidt zich door zijn lezenswaardigen inhoud het tijdschrift *Danubo* (°), orgaan der Bulgaarsche en Rumeensche sami-

PAYS BALKANIQUES. — Parmi les journaux esperantistes se distingue par ses articles très intéressants la revue *Danubo* (°), organe des samideanoj bulgares et roumains. Les der-

(°) Opstelraad en Beheer : 5, strato J. C. Bratianu, Bukarest (Rumenië). Inschrijvingsprijs voor het Buitenland : fr. 3.50 = Sm. 1.400.

(°) Rédaction et Administration : 5, strato J. C. Bratianu, Bucarest (Roumanie). Abonnement pour l'Étranger : fr. 3.50 = Sm. 1.400.

deanoj. De laatste nummers bevatten daarenboven zeer gewichtige mededeelingen over esperantische feesten, propaganda en werkzaamheden der groepen van Batak, Bela Slatina, Dupnica, Kjustendil, Sophia, Varna (Bulgarië), Bucarest, Jassi en Rošiori (Roumanie).

